.

# EKO 2023

Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro

ilei

Nia aganto pri instruado kaj progreso

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj


**EKO 2023 / 35. Junio 17, 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**

**Konstantaj helpantoj: Rob Moerbeek, Elda Doefler, Gbeglo Koffi.**

**Pezo: Word – nur teksto: 40 KB. Ĝia sveltigita PDF: 230 KB**

**Temas nur pri PDF, kiun SMG mem alkroĉis. La pezo de aŭtomate kreitaj PDF ne estas anticipe koneblaj.**


## KER-ekzamenoj denove ĉi-jare

KER-ekzamenoj havas formalan akcepton. La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe Novaĵoj.

-----

Titolo: Komenciĝis la retaj KER-ekzamenoj

Kategorio: Laste ĉe edukado

Teksto: Junio estas la monato de la retaj KER-ekzamenoj de UEA.

Estos tri semajnfinoj kiam de vendredo ĝis la lunda vespero okazos ekzamenoj. La evento komenciĝis la 2-an de junio, kiam 11 kandidatoj de diversaj niveloj trapasis parolan intervjuon. La ekzamenserion trapasos entute 75 personoj el dudeko da landoj. Legu pli ĉe la paĝo: https://edukado.net/novajhoj?id=893

## Interlingvistikaj magistraj studoj en Poznano

Jen la ligilo al la **varbfilmeto** kiun pretigis miaj nunaj ĉinaj studentoj (plejparte el la Universitato de Zaozhuang). Eble tio iom helpos en la varbado:

https://www.youtube.com/watch?v=m-MpZxrNdwk&t=4s

Ni ĵus partoprenis la **100-an Germanan Esperanto-kongreson** en Brunsvigo, Germanio, kie mi prelegis pri la studoj kaj pri interkultura komunikado. Jen foto (de Amri Wandel) kun miaj ĉinaj studentoj kaj la prezidanto de UEA, Duncan Charters:

https://www.facebook.com/photo/?fbid=10230419548662459&set=pcb.10230419555742636

La alvoko por la nova grupo de **interlingvistikaj magistraj studoj** (Esperante kaj angle) troviĝas sube. Tie troviĝas ankaŭ la alvoko por la **lasta instruista trejnado** kiu daŭras tutan jaron post la persona ĉeesto en septembro 2023 en AMU, en Poznano, Pollando. Ankaŭ en la junia *Revuo Esperanto* aperas raporto pri la

**25-jaraj postdiplomaj Interlingvistikaj studoj** kaj la novaj magistraj studoj. Aperis recenzo pri la libro ‘Esperanta kulturo’. Mi petas vian helpon en la varbado por la magistraj studoj kaj por la instruista trejnado, nun tio havas specialan valoron.

Prof. dr hab. Ilona Koutny, Universitato Adam Mickiewicz

## Irina artikolas el Rusio per Ondo

Hodiaŭ en la novaĵretejo “La Ondo de Esperanto” aperis artikolo de Irina Gonĉarova pri inform-instrua Esperanto-projekto, kiun la 17-jara lernejano Vladimir Petuĥov realigis en kelkaj mezlernejoj de Ĉeboksaro (Ĉuvaŝio, Ruslando).Tiu urbo estas hejmo por la sekretario de ILEI. Legu la artikolon ĉe https://sezonoj.ru/2023/05/ruslando-46/

## Estrara Komuniko de Kuba Esperanto-Asocio

Eldono pri majo 2023

### En la 44-jara jubileo de KEA: por aktiva esperantumado

Tiu jubileo de Kuba Esperanto-Asocio, kiun ni festas la 16-an de junio, estas momento por festi kaj memori, plani kaj aktivi por ke la kuba Esperanto-movado plu iru antaŭen, spite al la malfacilaj momentoj travivataj, kiuj baras tutlandajn ĉeestajn renkontiĝojn. Tial, festu loke, klube, grupe laŭ viaj ebloj. La 17-an de junio en la Nacia Sidejo de KEA okazos la ĉefa renkontiĝo kun enhavoriĉa programo kaj tosto je la plua sano de Esperanto en Kubo. Dume, la filio de Havano organizas kroman jubilean rendevuon la 24-a de junio, en la urba biblioteko Máximo Gómez, loko kie en februaro de la jaro 1979 okazis amasa esperanta kurso, kiu kreis la bazojn, kune kun la tiamaj pioniroj, por fondi en junio de tiu jaro la nunan KEA-an.

### La orienta esperantistaro ĝuis la Krisolajn Esperanto-Tagojn

En majo okazis la “Krisolaj Esperanto-Tagoj” ĉe la feriejo “La Sierrita” en la orienta provinco Granma. Partoprenis 12 esperantistoj el la provincoj Granma, Santiago de Kubo kaj Guantánamo. La regiona evento ebligis al la esperantistaro interŝanĝi pere de esperantaj kursoj, didaktikaj ludoj, historiaj ekskursoj kaj kulturaj eroj. Okazis interŝanĝo kun la loka kumunumo pri la internacia lingvo kaj la agado de la kubaj esperantistoj.

### Scienca agado en Esperantujo ĉe naciaj radiostacioj

En majo la Nacia Estraro kune kun la provinca filio Havano, kunordigis intervjuojn ĉe la naciaj radiostacioj Radio Rebelde kaj Radio Taíno, kun la celo multe pli vaste informi pri la scienca agado en Esperanto enlande kaj eksterlande, kun la fokusoj en la ĉefaj gravaj okazintaĵoj tra la mondo tiusence. Eblis profiti ambaŭ spacojn por informi pri la kursoj de la Nacia Sidejo de KEA kaj de la provinca filio. La naciaj amaskomunikiloj strebas al la konstanta diskonigo de la esperanta agado.

### Centro Castro ricevis ekzempleron de “La Historio absolvos min”

La pasintan 23-an de marto, la provinca filio Havano transdonis ekzempleron de la libro “La historio Absolvos min” esperantlingve al la Centro Fidel Castro en Havano. Ĝi estas konsiderata revolucia programo verkita de Fidel Castro kiel defenda dokumento prezentita dum la juĝo kontraŭ li pro la okazaĵoj de la kazerno Moncada en la orienta provinco Santiago de Kubo la 26-an de julio 1953, kiu markis turnopunkton en la kuba historio.

Dum interŝanĝo kun la laboristoj de la Centro kaj la havanaj esperantistoj, Niurka Alonso, prezidantino de la provinca filio, transdonis ĝin nome ankaŭ de la Nacia Estraro de KEA. Deflanke de la eldonejo de la libro, Monda Asocia Asembleo (MAS) partoprenis ĝia eldonisto, s-roVilhelmo Lutermano.

### Nova numero de la bitrevuo La Famo de Guantánamo.

En majo, aperis nova numero de *La Famo*, bitbulteno de la Esperanta grupo de Guantánamo, kiu celas disvastigi pere de Esperanto, la kulturajn valorojn de la provinco, la Esperanto-agadon en la teritorio kaj lokajn kuriozaĵojn. Estas alia ebleco praktiki la lingvon kaj multe pli konatiĝi kun la plej orienta el la kubaj provincoj.

### 1913 –2023: 110 jaroj jaroj de la gazetara kampanjo

En la jaro 1913 la Kuba Asocio por la disvastigo de Esperanto, lanĉis kampanjojn por lerni la lingvon senkoste en Kubo, kiu ja estis la ĉefa piliero de la informa laboro pri esperanto en tiu jaro. Kiel rezulto de tiu iniciato, estas sciate pri granda nombro de kubaj instruistoj kiuj lernis la lingvon, kaj en kvin gravaj bazaj lernejoj oni instruis la internacian lingvon. Eblas koni pri tiu ĉi fakto kaj pluraj aliaj rilataj al la grava historio de la esperanto-movado enlande, danke al la libro “El Esperanto en Cuba. Historia comentada, tomo 1” de la historiisto de KEA, Juan Ramón Rodríguez Gómez.

Redaktas: Ariadna García Gutiérrez, estrarano pri Informado (KEA)

## Francaj gelernantoj vizitas slovenajn gelernantojn

Valoras lernejaj kontaktoj, kiuj transpontas kulturojn. Esperanto estas ideala ligilo por antaŭenigi tiajn kontaktojn. Jen praktika ekzemplo en filma formo.

htps://youtu.be/ECbhkxWZrQE

Ni dankas pliajn informojn al Edvige Ackermann. La vizito okazis en Triesto kaj Koper. Agis en Koper la instruisto Peter Grbec. Dankon al Emmanuel kaj Peter.

Raporto pri tio aperas en <facila.org> https://uea.facila.org/loke/koper-r69/

Alessandra Madella kaj Anna Lowenstein

## Esperanto-klaso en Ĉinio – Nova versio de ‘La Espero’

Jen du filmoj de ILEI filmoj de ILEI

Gratulojn al la lernejestro Jado kaj al ĉiuj instruistoj kaj infanoj!

https://youtu.be/dJDAE_XPUhQ

La Espero: https://youtu.be/x9VfE9ISm7E

## Kursoj en Rumanio

➊ kurso por komencantoj, 9 personoj, gvidanto Mariana Pitar en Timiŝoara reta kurso, laŭ propra materialo pretigita por ĉiu kurso. Nomo de la universitato: Okcidenta Universitato de Timiŝoaro. Fako: Lingvistiko, Terminologio

➋ kurso por komencantoj, 8 personoj, gvidantoj Florica Popa, ĉeeste, laŭ propra materialo kaj la rekta metodo de Stano Marĉek.

➌ KONNERTH SARA gvidas kurson en Universitato Lucian Blaga de Sibiu. Fako: Matematiko

## Ondo da kongresanoj por Torino

Al la 108-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2023 en Torino), je la 1-a de junio aliĝis 1075 homoj el 61 landoj. Plej multe da aliĝoj (176) venis el Francio, sekvas la kongreslando Italio kaj Germanio. Vidu la laŭlandan liston kaj komparon kun la aliaj ĉi-jarcentaj UK-oj en la novaĵretejo "La Ondo de Esperanto" https://sezonoj.ru/2023/06/torino-15/

**SMG:** Laŭ la retejo de UEA, en la 16-a de junio estas 1098 aliĝoj el 64 landoj.

## Ĵurnalistoj denove en Litovio

La 16-a seminario de esperantistoj-ĵurnalistoj okazis de la 20-a ĝis la 21-a de majo 2023 en la vilaĝo Antalkiai (Litovio). Legu pli en la artikolo de Povilas Jegorovas, ĵus aperinta en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto*:

https://sezonoj.ru/2023/06/litovio-60/

**SMG:** Ĵurnalistoj kunvenis en Litovio jam en 2007, kun rimarkinde altnivela akcepto de urbaj kaj naciaj oficantoj. SMG partoprenis en tiu bele organizita kunsido post tag-nokta trajnvojaĝo el Hungario.

## Tutslovakia Kongreso okazos junie

Komenciĝas la somero kaj jam eblas aŭdi pri plej diversaj Esperanto-aranĝoj tra la mondo, unu el ili estas la Tutslovakia Kongreso kiu okazos de la 23-a ĝis la 25-a de junio 2023, sub la ĉeftemo: "Esperanto – kiel protekti kaj konservi nian kulturan heredaĵon". Ĝi okazos en la urbo Nová Dubnica. Fonto: Fejsbuko de Peter Balaž.

## Pola Kongreso

Tio okazos en la urbo Siedlce en la 20-a ĝis la 23-a de julio. Klaku la ligilojn por ekscii pli:

- Pri Siedlce – kongresejo, tranoktejo, mapo
- Provizora programo
- Kotizoj
- Ekskurso
- **Reta aliĝilo**
- Listo de aliĝintoj
- **Unua Bulteno**




======= vorto 1335: =======

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.


Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.


La arĥivo de EKO: : https://www.ilei.info/agado/EKO.php por 2023 (ĝis 30.).

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.